{341.12 : 408.92} (042)

## PRELEGOJ de ges-roj LAPENNA

Sabaton, la 16-an de majo, prelegis en Roterdamo gesinjoroj Lapenna antaŭ multcenta esperantista publiko, veninte parte el lokoj sufiĉe malproksimaj. Sinjorino Lapenna interese rakontis pri siaj infanaj jaroj en Siberio. Poste Profesoro Lapenna rakontis al ni pri la provizora sukceso atingita en la Ĝenerala Konferenco de Unesko en la fino de la pasinta jaro en Parizo. Li klarigis kiel ĉiuj objektivaj faktoroj unuanime aŭguris kompletan fiaskon — sendube vi jam legis pri tio en „Esperanto" aŭ „Heroldo de Esperanto" —, sed kiel spite UEA decidis ne akcepti la fiaskon anticipe, sed „doni la batalon". Kaj kun kia rezulto! La antaŭvidebla, ja, la antaŭvidenda, la preskaŭ certa fiasko fariĝis brila sukceso, dank' al la efika laboro de la Esperantistoj, de Prof. Lapenna kiu ĉeestis la konferencon kiel reprezentanto de UEA kaj kiu zorgis pri la informado de la diversaj delegacioj, — de la parizaj esperantistoj kiuj organizis brilan debatvesperon kiu montris al ĉirkaŭ 70 reprezentantoj de Unesko-delegitaroj kiel nia lingvo funkcias en la praktiko, spektaklo kiu tre profunde impresis la ĉeestantojn, — de tiuj esperantistoj kiuj tradukis nacilingven artikolojn pri la afero kaj aperigis ilin en la ĝusta momento en gravaj ĵurnaloj, kiuj tiel siavice influis la delegitojn, — de Prof. Privat, kiu persone sin turnis al la registaroj kaj delegitaroj de Svisujo kaj Hindujo. Ĉio ĉi fine turnis la ŝajne neeviteblan fiaskon en sukceson: kiel oni jam scias: la svisa delegitaro proponis rezolucion, kiu fine estis akceptata kun brita amendo.

La sekretariejo de Unesko ricevis la taskon raporti pri la afero al la Ĝenerala Konferenco okazonta en 1954 en Montevideo. Tiu raporto devas esti bazita sur informoj de la naciaj registaroj. Kaj jen do nova tasko por la esperantistaro: zorgi ke tiuj raportoj de la naciaj registaroj efektive venu kaj estu laŭeble favoraj. Kaj kiam en 1954 en Montevideo la dua akto estos ludata, kiu antaŭvideble estos de decida graveco, la esperantistoj intervenu ne malpli efike ol pasintjare en Parizo. Nu, UEA jam decidis ke tiel estos. Ĉar Montevideo, tamen, estas malproksime, la vojaĝo kaj restado, ktp. multekostaj, la estraro de UEA kreis apartan fondajon, fidante ke la Esperantistoj, konsciante pri la graveco de la afero, volonte kaj malavare oferos al tiu „Fondajo Montevideo" (pere de la ĉefdelegitoj de UEA, aŭ rekte al ĝia Centra Oficejo en Rickmansworth).

Ni ja lernu nian lecionon. Parizo montris ke eĉ ŝajne certa fiasko povas fariĝi venko kaj sukceso. La esperantistoj en Nederlando spertis la malon: ŝajne certa sukceso fariĝis malvenko, ĉar oni opiniis ke jam estas superflue ankoraŭ interveni. Kaj tiel povis okazi ke registara propono permesi la instruadon de Esperanto en lernejoj en la oficialaj horoj, kun diferenco de kelkaj voĉoj, fiaskis en la parlamento, ĉar ĉiuj ĉeestantaj delegitoj de la granda katolika partio senescepte sekvis la konsilon de sia „instruada eksperto" kaj voĉdonis kontraŭ la propono de la ministro, spite tion, ke nia afero inter la alipartiaj parlamentanoj trovis kelkajn tre bonajn advokatojn!

Ni, esperantistoj, do konu nian devon. Montevideo fariĝu sukceso!

— W. P. R.

342.34 : 330.1



## NIA MALSANA SOCIO; KONTRIBUO AL DIAGNOZO KAJ TERAPIO

de W. P. ROELOFS (Nederlando).

Sendube la homoj havas, fundamente, similajn dezirojn. Ni diru ke ni deziras „feliĉon". Ja diversaj homoj eble diverse imagas „la feliĉon". Tio implicas ke ĉiu deziras liberon strebi al „sia" feliĉo. Ni ankaŭ scias, ke tre multaj homoj opinias, ke ilia vero estas la absoluta vero, ke absolutaj estas la normoj kiujn ili agnoskas, ke tiuj iliaj normoj validas por ĉiuj homoj senescepte, ankaŭ por tiuj kiuj ne agnoskas ilin. Ili volas trudi siajn normojn; kie kaj kiam ili havas la potencon ne malofte ili ekstermas tiujn kiuj ne submetiĝas. Se estas pli da ekvilibro inter la diversopiniaj grupoj, evidente la mezuro de ĉies libero dependas de ĉies toleremo, kiel ankaŭ de ĉies civitana konscio kaj sento de respondeco, de ĉies respekto antaŭ la rajtoj de aliuloj. En ĉi tiu konekso mi atentigu pri kelkaj interesaj artikoloj antaŭnelonge aperintaj en *Sennaciulo* pri „la valoro de la laika principo".

Kiom ajn diversaj cetere estas la homaj opinioj, la granda plimulto de la homoj deziras bonfarton, liberon kaj pacon. Rimedo por atingi ĉi tiujn bonaĵojn ŝajnis la demokratio. Antaŭe subpremis la popolojn monarkoj absolutaj kaj nobeloj. Iom post iom multaj popoloj perbatalis kaj elluktis demokratiajn formojn, sed restis mizero kaj restis ekspluatado, kaj restis milito. La demokratio staras malfirme, ĉar ĝi daŭre seniluziigas la homojn. En 1933 plimulto de la germana popolo pretis forĵeti la demokratiajn formojn favore al ŝtata absolutismo, esperante ke ĝi alportos savon el la ne plu tolerebla mizero. Oni devas konstati ke plej danĝera malamiko de la demokratio ne estas bolŝevismo, faŝismo, nazismo aŭ simila ŝtata absolutismo, sed la daŭra nekapablo kaj misfunkciado de la demokratio, ĝiaj daŭraj misrezultoj.

Pri tiuj misrezultoj ni ne miru. Ili estas la rekta sekvo de ĝenerala miskoncepto pri „demokratio". Estas nepre evidente ke la popolamaso ne estas kompetenta juĝi pri ĉiaspecaj teknikaj aferoj, t.e. pri la metodoj. Pri metodoj ĝi povas doni nur moralan juĝon. Estas same kompreneble ke la spertuloj, la „teknikistoj", emas supertaksi sian specialan fakon; kaj tial ne estas prudente lasi al ili difini la celojn. La konkludo do estas: la popolo difinu la celojn, postulu — pere de siaj parlamentaj reprezentantoj — konkretajn rezultojn; anoncu sin tiuj teknikistoj kiuj deklaras sin kapablaj kaj pretaj liveri la rezultojn deziratajn. El inter ili oni nomu ministrojn, kiuj respondecu antaŭ la parlamento.

Pri la miskoncepto pri demokratio atestas la ĵusa decido en okcidenta Germanujo, ke partioj ricevintaj poe malpli ol 5% de la voĉoj, ne estos reprezentataj, ĉar iliaj parlamentaj frakcioj estus tro malgrandaj por taŭge fari sian laboron [1]). Sendube la malmultaj anoj de tia frakcio ne povus trastudi la sennombrajn teknikajn aferojn pri kiuj nuntempe sin okupas niaj parlamentaj

[1]) Se la ĉefa celo estis ekskludi la komunistojn, ĉi tiu decido substrekas la miopecon de la sinjoroj politikistoj.